

la 30^{an} de Junio 1930

Kara Amiko

Vi certe devas pensi ke mi forgesis vin, sed tute ne. Revenante antaŭ kelkaj tagoj de Anglujo kie mi pasigis kelkajn semajnojn mi tuj okupiĝis pri la p.m. por Eva + mi kunsendas ilin - tiujn kiujn mi povis trovi. Okaze, se mi havos aliajn mi sendos ilin.

Dankon por la Progreso + precipe por via P.K. el Dresdeno. Mi ne povas danki ĉiujn kiuj subskribis kompreneble sed multe ĝojigis¹ min tiu de Von Frenckell kiun mi konas de muljaroj.

Dankon ankaŭ por la tre interesa P.K. de via Juĝejo, lernejo, k.t.p. Tre tre interesa.

Mi esperas ke la Dresdena Kongreso plene sukcesis, sed mi supozas ĉar la D'a² grupo estas ĉiam tre lerta, agema.

Estas hodiaŭ tre treege varme + ni ne estas alkitimataj. Oni devas fermi la fenestrojn, alimaniere estas kvazaŭ en forno. Tamen, estas iom da vento, mirinde! Sendube ĉe vi estas same - sed vi ne havos venteton ĉar vi ne estas apud la maro.

De post 5 tagoj mi ricevis hejme, mian bofratinon kun fratino + pro tio ne povis tuj respondi al viaj afablaĵoj.

Je la 27^a Julio ni foriros malproksimen al Cauterets, en la Pyrénéaj montoj ĝis fine de Aŭgusto. Mi el tie sendos P.K.

Nune, tre laca pro varmego, mi finas sendante multe da amikaĵoj + amikeco. Ĉiam amike

Alice Sergeant

¹ ĉu "ĝojigis" ?

² ĉu oni komprenu "Dresdena" ?